PAŜOJ AL PLENA POSEDO
la perfektiga lernolibro
denove estas havebla!

PILO-PRESS
Internacia Informservo
N-ro 1/1975 - 6 jan 1975
Aperas ĉiusemajne

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 463649; 514269

## La Esperanto-Movado en 1975

## Novjara mesaĝo de la prezidanto de UEA

Karaj geamikoj!

La situacio de la Internacia Lingvo Esperanto, kaj la perspektivoj por la estonteco, estis neniam pli helaj ol ili estas nun, ĉe la sojlo de 1975. La progreso de Esperanto en ĉiuj medioj en la pasintaj kelkaj jaroj klare pruvas tion. La lingvo estas nun instruata en lernejoj en preskaŭ ĉiuj regionoj de la mondo, ĝi gajnas pli da atento kiel serioza esplorobjekto en niaj universitatoj, kaj la studado de lingvaj problemoj ĝenerale pliintensiĝas. Samtempe nia lingvo progresas en diplomatio, kiel pruvis ekzemple la impona reprezentiĝo kaj la aktiva intereso pri la lingvo flanke de diplomatoj en la Universala Kongreso en Hamburgo. Apero de granda nova komerca vortaro en la tuj pasinta periodo estas unu indiko pri progreso en la komercista medio. En nacia politiko, la demando pri Esperanto fariĝis subite viva: multaj parlamentanoj en pluraj landoj (ekzemple Britujo kaj Italujo) prenis poziciojn favorajn al la utiligo de nia lingvo, kaj la nombro plialtiĝas. Oficiala interesiĝo pri Esperanto en plej altaj niveloj de la hungara registaro estis evidenta lastatempe, kaj similajn evoluojn ni vidis ekzemple en Suda Koreujo kaj Norda Vjetnamujo. Nia literaturo floras: novaj literaturaj premioj anonciĝas, kaj oni reorganizas la Belartajn Konkursojn; la eldonejo Stafeto, kaj eldonejoj speciale en Japanujo, daŭrigas sian gravegan agadon. Aparte kuraĝiga estas renoviĝo de aktiva intereso pri kongresoj kaj konferencoj: la Estraro de UEA havas antaŭ si plurajn invitojn de diversaj landoj por la Universalaj Kongresoj, kaj kelkaj landoj (ekzemple Aŭstralio) planas regionajn aŭ specialigitajn konferencojn. UEA lastatempe eldonis la kronan verkon de la unua periodo de la Centro de Esploro kaj Dokumentado. Kun titolo "Esperanto en Perspektivo", ĝi liveras al ni la plej plenan kaj efikan faktaron pri Esperanto nun ekzistanta.

Malgraŭ la imponaj atingoj, la laboro kiu staras antaŭ ni estas grandega. La mondo eniras periodon de ekstrema perturbiĝo: tradiciaj aliancoj fendiĝas, internaciaj organizoj estas streĉitaj, la rilatoj inter nacioj ŝanĝiĝas kaj transformiĝas. La monda ekonomio suferas ekstremajn streĉojn. Kvankam ĉio ĉi malhelpas kelkrilate la agadon por Esperanto (speciale kiam temas pri la ekonomio), ĝi ankaŭ prezentas unikajn eblecojn. Pli ol kutime la nacioj sentas la barilojn kiujn prezentas la superflua rivaleco inter lingvoj kaj inter kulturoj. Alproksimiĝas la tempo kiam, kun la helpo de la parolantoj de Esperanto, la diversaj ŝtatoj komprenos, unufoje por ĉiam, ke la lingva demando ne devus esti politika demando, kaj ke la adopto de unusola neŭtrala lingvo por internacia komunikado, kia estas Esperanto, forigus el la internacia medio la interbarakton de la lingvoj.

Ni sukcesos en tiu strebado por la adopto de Esperanto nur se ni estos pretaj. Malgraŭ iom grandaj atingoj en evoluigo de modernaj lernilo en pluraj landoj (ekzemple Britujo kaj Germanujo), niaj kapabloj efike instrui Esperanton al grandaj amasoj da homoj bezonas plifortigon. Malgraŭ la relativa stabileco de la Universala Esperanto-

Asocio kaj la diversaj naciaj organizoj, la financa situacio de nia movado restas tre serioza. Malgraŭ la relativa sukceso de niaj Universalaj Kongresoj, ilia rolo kiel ĉefaj forumoj de nia movado kaj kiel kulturaj manifestacioj bezonas pli aktivan pritrakton de nia membraro kaj niaj gvidantoj. Malgraŭ la pli vasta studado de la lingva fenomeno Esperanto, la temo bezonas multe pli da atento de seriozaj studantoj.

Estas evidente, ke ni venkos niajn problemojn kaj kaptos kaj ekspluatos okazojn kiuj sin prezentas al ni nur per plej efika kaj harmonia kunlaboro. Kiel vi scias, mi estas nova prezidanto de UEA. Mi deziras, ke mia prezidanteco estu periodo kiam la esperantistoj reunuiĝos en spirito de toleremo kaj klarvido sub la neŭtrala standardo de nia ĉefa internacia Esperanto-asocio. La laboro antaŭ ni estas tro granda, kaj la idealo estas tro grava, por permesi al ni la lukson labori en iu ajn alia spirito ol plena harmonio.

La jubilea, 60-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Kopenhago, Danlando, fine de julio kaj komence de aŭgusto 1975. La programo estos esperëble sukcesa kombino de tradiciaj eroj kaj novaj elementoj, kaj de laboro kaj ripozo. Ni speciale emfazos la aktivan partoprenon de la kongresanoj en la diskutoj kaj decidoj, tiel ke ĉiu ĉeestanto sentu sin partoprenanto kaj ne simple aŭskultanto. En la kongreso ni pritraktos demandojn gravajn por la estonteco de nia movado, kaj ni esperas, ke multaj el niaj membroj (kaj aliaj) partoprenos la kongreson, diros sian opinion, kaj ĝuos la gastamon de la dana ĉefurbo.

Mencio de la Kongreso memorigas min, ke unu el la specialaj atingoj de la Esperanto-movado estas nia tutmonda reto de komunikado. Per nia granda Esperanto-gazetaro, kaj per la radio, kie Esperanto fariĝis inter la pli gravaj lingvoj internacie elsendataj, tiu ĉi mesaĝo atingos ĉiujn partojn de la mondo. Samtempe ni estas intima movado: oni senpere komunikas je ĉiuj niveloj. Nome de la Estraro de UEA, mi aparte petas vin ekzerci tiun kapablon, kaj sendi al ni viajn sugestojn, ideojn, kaj petojn. Ni bonvenigos ilin.

Al izolitaj esperantistoj, samkiel tiuj en fortaj lokaj movadoj; al esperantistoj malofte aktivaj, samkiel tiuj kiuj multe aktivas; al parolantoj de Esperanto de ĉiu politika koloro, ĉiu socia tavolo, ĉiu nacia kaj kultura fono, la Estraro de Universala Esperanto-Asocio, kaj mi persone, deziras sanon, feliĉon, kaj grandajn novajn sukcesojn por Esperanto en 1975.

Humphrey Tonkin
Zamenhof-Tago 1974

*********************

## Demandoj pri Esperanto

Wageningen (pp) G.F. Makkink, nederlanda reprezentanto de Eŭropa Esperanto-Centro informas:

Sinjoro C. Laban, membro de la Nederlanda kaj Eŭropa Parlamentoj por la Partio de la Laboro (P.v.d.A.) direktis sub la dato de la 12-a de decembro 1974 jenajn tri demandojn skribajn al la Komitato de la Eŭropo-komunumoj:

1. Ĉu la Komitato intencas esplori la eblojn por stimuli la instruadon kaj uzadon de Esperanto en Eŭropa kadro?
2. Ĉu la Komitato opinias ke tio realigus la esperojn kiujn ĝi esprimis en ĝia memorando al la Konsilio? (Dok. 23/74 Anekso p. 22, parto 44, 45, 46 angla eldono)

(Daŭrigo sur p.3)

Demandoj pri Esperanto (daŭrigo)

3. Ĉu la Komitato ne konsentas ke konvinka argumento favore al la uzado de Esperanto kiel dua lingvo en Eŭropa kadro estas ke ĝi forigus la malavantaĝon en internacia komunikado de tiuj kies patrina lingvo estas ne unu el la plej vaste uzataj lingvoj?

***********

S-ro G.F. Makkink opinias, ke estus grave ke tiuj esperantistoj kiuj pozitive povus influi membrojn el Eŭropaj Institucioj instigu ilin al subtenaj paŝoj.

## Jarfinaj aranĝoj en Paderborn

Paderborn (pp) En Paderborn okazis la antaŭanoncitaj diversspecaj aranĝoj jarfine. Pli ol 80 gejunuloj el 18 landoj partoprenis la Internacian Seminarion de Germana Esperanto-Junularo sub la temo "Natursciencoj - ĉu nur por fakuloj?" Kadre de la Seminario funkciis KER-seminario de TEJO pri la temo "Ekstera agado - kial, kiel, kien?". La Silvestra Balo en tri ejoj de la junulargastejo arigis ne nur la gejunulojn, sed Paderbornanojn kaj esperantistojn el multaj lokoj. Funkciis tri intensaj kursoj en la Altlernejo, estis celebrita Sankta Meso, okazis akcepto en la urbodomo kaj oftaj vizitoj en la Esperanto-gastejo "Bareleto". Infanoj, kiuj nun lernas Esperanton en lernejoj, faris siajn unuajn konversaciojn en Esperanto kun eksterlandaj gejunuloj. Konsiderante la fakton, ke ili lernas nur de septembro 1974, la rezultoj estas kontentigaj kaj certe kuraĝigaj. Dum du tagoj Libroservo Pickel el Nürnberg faris libroekspozicion en la plej granda magazeno de FR Germanio, en Supermarkt "Südring" de Paderborn, kun kontentiga rezulto. Eble estis la unuan fojon, ke klientoj de magazeno estis alparolitaj en Esperanto per laŭtparolilo.

## Sciigo de la GEA-kasisto

Bensheim (pp) La kasisto de Germana Esperanto-Asocio, Heinrich Nischwitz, 614 Bensheim, Postfach 253, sciigas: "Por havi plejeble fidindan membrociferon, mi petas ĉiujn grupojn, kiuj ne liveras al mi aŭtomate ŝanĝinformojn, sendi baldaŭ aktualan membroliston laŭ la stato de januaro 1975, se eble kun la kotizkategorioj. Mi povas cetere disponigi formularon "Veränderungsmeldung" por ebligi al ĉiu grupo aŭtomatajn ŝanĝinformojn.
Individuajn membrojn, kiuj ne jam pagis sian kotizon por 1974, mi petas urĝe fari tion, ĉar ni devas alikaze interrompi la liveradon de la gazeto."

## Konciza agadraporto 1974

Nürnberg (pp) Multe da laboro por Esperanto, speciale informado en germana lingvo kaj Esperanto, estis farita en la kadro de Informcentro Esperanto Nürnberg en la jaro 1974.

Estis eldonitaj kaj ekspeditaj:
44 numeroj de Pilo-Press, ĉiu numero en eldonkvanto de 300 ekz.
20 numeroj de Esperanto-Nachrichten-Dienst po 500 ekz.
7 numeroj de Germana Esperanto-Revuo (po 2000 ekz.), n-ro 8/74 aperas en januaro 1975.
N-ro 2 de Dokumente-Informationen, Bormann: Die Einigung Europas und ihr Sprachenproblem (1000 ekz.)
N-ro 3 de Dokumente-Informationen, Makkink: Das Problem der Kommunikation in der Welt (2000 ekz.)
Eniris kaj estis prilaboritaj 2 308 leteroj, poŝtkartoj kaj informpetoj, kaj mendoj.
Pli ol 20.000 leteroj, poŝtkartoj kaj presaĵoj estis ekspeditaj.

Agadraporto

Centoj da interesuloj informiĝis pri Esperanto, skribe, telefone, persone.

Estis venditaj 506 lernolibroj "Wir lernen Esperanto" kaj 20 ekz. de Esperanto Programita, krome multaj aliaj lerniloj.

Pli ol 100 librovendejoj mendis E-librojn aŭ petis libroliston.

Libroservo Pickel okazigis 13 libroekspoziciojn en 12 lokoj, nome en Ober Ramstadt, Nürnberg, Hamburg, Münster, Fürth/B, Bamberg, Aachen, Frankfurt/M, Paderborn (2), München, Kronach, Wiesbaden. Tiucele necesis veturi pli 7500 km per aŭtomobilo.

************

Esperanto en la radio

Hodiaŭ ni publikigas la lastan "Aktualan komentarion" de la jaro 1974 de d-ro Alfred Macher, disaŭdigitan de Radio Vieno la 28/29 dec 74. Ĝi tekstas:

"Preskaŭ ĉie en la mondo la politika laboro paŭzas dum la lastaj tagoj ĉirkaŭ la jarŝanĝo. Restas tempo por fari jarbilancon. En la kazo de la Aŭstria Kanceliero Bruno Kreisky konvenas bilanco pri eĉ kvar jaroj. Ĉar antaŭ kvar jaroj li komencis sian socialdemokratan regadon, anoncante liberalan politikon - kontraŭdiro solvebla nur per kompromiso.
La socialista parlamenta plimulto kreis ne nur nombron da vere socialdemokrataj leĝoj, sed ankaŭ liberale koloritajn, kaj fine leĝojn konformajn al kaj socialdemokrataj kaj liberalaj principoj. Al la laste nomita, miksa kategorio apartenas la modernigo de la punjuro, pri kiu ĉiuj partioj konsentis - esceptante la paragrafon pri senpuneco de abortigo dum la unuaj tri monatoj de gravedo.
El socialdemokrata spirito fontis la plibonigo de la virinaj rajtoj, el liberala la diferenciga impostreformo.
Kiel interrilatas la socialista kaj la liberala partioj? Ĉu ili povus koalicii? Ĉu eble post la elekto en 1975? Kreisky opinias, ke la liberala partio konsistas parte el vere liberalaj anoj, parte el konservativaj, eĉ reakciaj, kaj li rifuzas politikon nur duone socialistan.
Konsiderante la rilaton inter socialista partio kaj Sindikata Ligo, Kreisky konkludis, ke harmonio inter ili nepras por pludaŭro de la socialista politiko, kaj ke tiu pludaŭro, aliflanke, tre gravas por la sindikatoj. Anton B e n y a, prezidanto de la Sindikata Ligo, akcentas, ke en vera demokratio la sindikatoj servas al ĉ i u j ŝtatanoj, ke apartenas al ili preskaŭ ĉiuj dungitoj, ke tial strikoj ne bezoniĝas kaj traktado inter la sociaj partneroj sufiĉas - sindikata ligo, pri sia respondeco konscia, ĉiam agos laŭ la tutekonomia situacio. Hans I g l e r, prezidanto de la Industriista Unuiĝo, deziras antaŭ ĉio, ke ni ĉiuj nun s e r i o z e nin moderu kaj ŝ p a r u! Ĉar neniam kaj nenie senpensa elspezado fruktodonis. Ni ne forgesu tion venontjare!"

Radio Vieno elsendos la 11/12 jan 75 radian artikolon de d-ro Karl Beckmann pri "La Problemo de la Suda Tirolo" originale verkita en Esperanto. Aŭskultu kaj skribu!

Nova konkurso de Radio Varsovio

Radio Varsovio anoncas novan konkurson. Okaze de la 30a datreveno de la dua mondmilito oni petas pri respondo al jena demando:

> Kiaj pensoj venas al vi lige kun la proksimiĝanta 30a datreveno de la venko super faŝismo kaj finiĝo de la dua mondmilito?

Respondon oni sendu ĝis la 9a de majo 1975 al Pola Radio, Esperanto-Redakcio, PL-00-950 Warszawa 1, P.O. Box 46, Pollando.